



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2003 numero 4-a: septembro / oktobro
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de septembro



Impartial foto Galley

**Dum la inaŭgura kunveno de la 76-a kongreso de SAT,
laŭ foto aperinta en *L'Impartial* la 14-an de julio.**

La kultura reprezentanto de la urbo La Chaux-de-Fonds, sinjorino Lise Berthet (dua el la dekstro), en sia saluto al la kongresanoj tre pozitive parolis pri esperanto kaj pri la graveco de CDELI.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031,
CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch &
gacond@bluewin.ch

& ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude GACOND

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy FONTANNAZ, Andy KÜNZLI,
Richard SCHNELLER.

SES informas

Redaktaj datlimoj por la venontaj numeroj

2003-5: novembro-decembro: oktobre 15.
Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

2004-1: januaro-februaro: decembre 15.
Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

2004-2: marto-aprilo: februare 15. Mencio
de informoj ekde la 15-a de marto.

SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. &: 031 921 44 59. Ret-
poŝto: bgraf.o@bluewin.ch.

Dietrich WEIDMANN, vicprezidanto, PF 301,
8034 Zürich. &: 01 251 50 25. Retpoŝto:
info@esperanto.ch.

Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des
Lys 4, 1010 Lausanne.&: 021 653 14 67.
Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.

Elisabeth LAUPER, kasisto, Chapeau Rablé
42, 2300 La Chaux-de-Fonds. &: 032 914
39 34.

Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.

Chiara FABBRI, peranto itallingva kaj junul-
ara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto:
chiara-fp@bluewin.ch.

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Anoncoj

| Paĝo | Neesperantistoj & komercaj | Esperantistoj & nekomercaj |
|------|-------------------------------|-------------------------------|
| 1/8 | F 40 | F 20 |
| 1/4 | F 70 | F 35 |
| 1/2 | F 110 | F 55 |
| 1 | F 180 | F 90 |



Svisa kalendaro

Septembre

- 20-21:** Fribourg: Svisa Socia Forumo
25: Basel: ESB: kunveno.
27: Lausanne-Rolle: **Centjara jubileo de la fondo de SES** kaj komenco de la jubilea jaro.

Oktobre

- 01:** Luzern: LES: kunveno.
01: Wil: EKW: kunveno.
23: Basel: ESB: kunveno ĉe fam. Focke-Bérout.
25: **Lausanne:** Ĝenerala Asembleo de JES.

Novembre

- 04:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
05: Luzern: LES: konversacia rondo.
05: Wil: EKW: kunveno.
15: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
15: Rotkreuz: SAEF: 41-a GERI.
25: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
27: Basel: ESB: kunveno.

Decembre

- 03:** Luzern: LES: Zamenhofa festo.
03: Wil: EKW: Adventa vespero.
06: Genève: esperanta marŝo al Palaco de Nacioj.
09: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
27 ĝis 3 jan.: Kiel: 20-a IFJ.

2004 Januare

- 06:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
07: Luzern: LES: Konversacia rondo.
17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.

Februare

- 03:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
13: Mitholz: JES-SES: Lötschberg-tunela vizito.
13-15: Kandersteg: JES: Svisa vintra semajnfino.
17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Marte

- 09:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
23: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.

Maje

- 04:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
15: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.

Junie

- 08:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
22: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.

Novembre

- 20:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Kiam datoj de esperanto-okazaĵoj ne aperas en la *Svisa kalendaro*, la kaŭzo estas bedaŭrinda neglekto informi fare de la koncernaj organizantoj.

Vivo de SES



Festado de la centjara jubileo de la fondo de SES

Sabaton 27-an de septembro 2003
Lausanne-Ouchy-Rolle

Festa programo

Lausanne -Ouchy

1. Ekde la 09h45: **Rendevuo ĉe la hotelo *Le Château d'Ouchy***, ĉe la placo de la haveno de Ouchy.

Tie vi estos muzike salutata de la alpa kornisto Rémy Schroeter, kiun eĉ duece akompanos François

Randin), antaŭ sia deĵorado kiel filmisto de la festotago.

2. En la salono aŭ la ĝardeno de la kastela hotelo (laŭ la vetera humoro) **akcepta kafumo** kun korn-bulkoj kaj variaj trinkaĵoj, sen-soifigos kaj redonos forton al la vojaĝintoj forlasintaj frumatene sian hejmon.

3. 10h15-10h45: Malfermo.

- a. Saluto de Bruno Graf, prezidanto de SES.
- b. Muzika momento kun Marion Bélisle-Grosjean: 1-a suito por violonĉelo sola de J.-S. Bach.
- c. Saluto de la laŭzana urbestro Daniel Brélaz.

Ŝipa veturo

4. 10h45: Enŝipiĝo alp-korne anoncita.

5. 11h00-12h12: Unuaklasa ŝipa veturo aperitiva al Rolle, kiun vigligos:

- a. rakontoj de Andy Künzli kaj Claude Gacond pri la historio de SES,
- b. salutaj kontribuajoj de SES-anoj el la tuta lando kaj de reprezentantoj de lokaj kaj fakaj societoj,
- c) kantoj de membroj de Laŭzana Esperanto-Societo,
- d) diversajoj.

En Rolle

6. 12h12: Elŝipiĝo en Rolle.

Grupa fotado ĉe la haveno ĉirkaŭ la alpa kornisto kaj promenadeto ĉe la bordo de la lago.

7. 13h00: Komuna tagmanĝo en la havena restoracio Casino:

Menuo a.

Petite salade de rampon, œufs et lardons.

Assiette de filets de perches, frites ou pommes nature, sauce tartare.

Mousse de fruit maison.

Menuo b. (por vegetaranoj):

Petite salade méléée.

Omelette aux champignons, frites.

Sama deserto.

Menuo c (por infanoj):

Demi-assiette avec frites kaj sama deserto.

8. La bankedon variigos kaj konkludos kulturaj momentoj kun salutvortoj de la lokaj aŭtoritatoj kaj de la rolanino Marguerite Jaccard, recitado de poemoj de Edmond Privat far Luc Allemand, prelegetoj de Claude Gacond, Bruno Graf, Mireille Grosjean, Andy Künzli kaj Claude Piron, k.c.

Muzika momento kun kantoj violonĉele akompanataj far Marion Bélisle-Grosjean: kun Jean-Thierry von Büren: La Espero, kaj kun Joël Grosjean: Himno de Ĝojo de L. van Beethoven, I. S. (Amplifiki), Gracias a la vida / Dankon al la vivo de V. Parra.

9. 15h30: Promenado tra la urbo.

10. 17h00: Kuniĝo ĉe la stacidomo kun adiaŭaj kantoj de laŭzananoj kaj lasta alpkorna muzikado de Rémy Schroeter.

Trajna reveno

11. 17h15: Trajna forveturo al Lausanne.

12. 17h36: Alveno en Lausanne.

13. Adiaŭa sensoifiĝo en la stacidoma bufedo.

Aliĝo kaj pago:

Aliĝo kiel eble plej rapida estas absolute necesa, ĉar la lokoj ne nur en la ŝipo kaj trajno, sed ankaŭ en la restoracioj, devas esti rezervitaj kaj antaŭanoncitaj kelkajn tagojn antaŭ la sabato. Por la komuna tagmanĝo la nombro da manĝantoj estas eĉ limigita je 70. **Tial nepre tuj utiligu la aliĝilon, kiu estas aldonita al la bulteno SES informas** por senprokraste konigi vian aliĝon kaj tiujn de viaj amikoj.

Ĉiu aliĝinto ricevos pagilon al la poŝta ĉekokonto 17-334343-4: Renkontoj de Esperanto-perkoresponde, por la pago, kiu lin koncernas. Do **ne utiligu tiucele la pagilon de SES**, kiu ĉiam akompanas la bultenon alvokante al donacemo.

Ĉar la vojaĝkostoj ŝipa kaj trajna estas enkluditaj en la programo, tial elekteblas diversaj programtarifoj, kiuj estas klare indikitaj sur la aliĝilo. Tiuj prezoj dependas de la posedo aŭ ne de trajn-abonoj duontarifaj aŭ ĝeneralaj. **Por posedanto de duontarifa trajnabono la suma prezo de la festotago estas frankoj 60.** Ĝi inkludas ĉion: la kafumon en la kastela hotelo de Ouchy, la ŝipan aperitivan veturon unuaklasan, la tagmanĝon en Rolle (krom la trinkaĵoj) kaj la trajnan revenon.

Je sia alveno en Ouchy, ĉiu aliĝinto ricevos insignon kun la propra nomo, kiu validos kiel pagatestilo.

Aŭtaŭĝojas vin renkonti dum tiu festotago Claude Gacond kaj ties kunlaborantoj.

Forveturhoroj por akurate alveni en Ouchy

Aarau (via Biel): **7h35** – Alveno Lausanne: 9h33
Basel: **7h24** - alveno Lausanne: 9h33
Bern: **8h47** - alveno Lausanne: 9h54
Biel: **8h35** - alveno Lausanne: 9h33
La Chaux-de-Fonds: **8h16** – Lausanne: 9h33
Fribourg: **9h09** - alveno Lausanne: 9h54
Genève: **9h18** - alveno Lausanne: 9h57
Luzern (via Olten): **6h54** – Lausanne: 9h33
Neuchâtel: **8h52** - alveno Lausanne: 9h33
Olten (via Biel): **7h47** - alveno Lausanne: 9h33
St.Gallen (via Bern): **6h11** – Lausanne: 9h54
Sion: **8h14** - alveno Lausanne: 9h21
Solothurn: **8h11** - alveno Lausanne: 9h33
Thun (via Bern): **8h18** - alveno Lausanne: 9h54
Vevey: **9h07** - alveno Lausanne: 9h21
Winterthur (via Bern): **6h58** - Lausanne: 9h54
Yverdon: **9h12** - alveno Lausanne: 9h33
Wil: (via Bern): **6h39** – alveno Lausanne 9h54
Zürich (via Bern): **7h34** - alveno Lausanne: 9h54

Je via alveno en Lausanne vin atentos sur la stacidoma kajo esperantisto, kiu gvidos vin al la haveno de Ouchy pere de la subtera funikularo Metro. Vi havu je dispono la necesan veturkoston sumon je frankoj 2 (plena tarifo) aŭ franko 1 (duontarifo).

Aŭtomobiloj trovos parkokon okcidente de la haveno de Ouchy je distanco dekminuta piede de la rendevuejo.

Donacoj

Donacoj en frankoj al SES: Yvonne Aeby, Genève: 20; Jacques Anselme, Epalinges: 20; Pierre Dorthe, Lausanne: 30; Nancy Fontannaz, Pully: 50; Yvette Goy, Cully: 10; Rémy Grandjean, Fontainemelon: 30; Hans-Werner Grossmann, Muttenz: 30; Antoine Longchamp, Lausanne: 15; Barbara Muhlemann, Nyon: 20; Daniel Stoffer, Zürich: 5; Lisette Testaz, Ollon: 25; Marguerite Viredaz, Lausanne: 20; Armin Weidmann, Uerikon: 30; Liliane Wenger, Chez-le-Bart (memore al Alfred): 100; Anonima: 50; Sume: 455.

Donacoj en frankoj por la "Agado 2003": Pierrette Blanchet, Lausanne: 20; Tazio Carlevaro, Bellinzona: 50; Jean-Jacques & Eliane Lavanchy, La Tour-de-Peilz: 200; Jeanne Mamin, La Tour-de-Peilz: 30; Dieter Rooke, Oensingen: 20; Richard Schneller, Kronbühl: 25; SVDS Schweiz. Verein für die Deutsche Sprache: 80; Christiane Sixtus Pot, Perly: 100; Sume: 525.

Ni rememorigas, ke la Agado 2003 celas digne festi la centjaran jubileon de SES kaj de la veno al esperanto en 1903 de la pioniroj Hector Hodler kaj Edmond Privat, tio ĉi per publikrilatigaj agadoj kaj per eldono de *Enciklopedio de Esperanto kaj planlingvistiko en Svislando* redaktata de Andy Künzli. Tiu ĉi Agado 2003 plu daŭros dum la tuta jubilea jaro 2003-2004 per sinsekvo da manifestacioj.

Nome de SES la kasistino Elisabeth Lauper kaj la redaktoro Claude Gacond dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco.

-OOO-

Informations sur l'espéranto

Agado prizorgata de Mireille Grosjean

La informa porgazeta agado de Mireille Grosjean havas fruktodonajn eĥojn, kiujn respogulas fotoj, kiujn ni publikigas en tiu ĉi numero de *SES informas*.

En aŭgusto, sub la ĝenerala titolo *L'espéranto vit [Esperanto vivas]* Mireille Grosjean havigis al cento da gazetoj plurajn tekstojn, informojn pri la evolukapablo de esperanto, paĝon biografian pri Tazio Carlevaro, la Rezolucio de la 88-a Universala Kongreso en Göteborg, kopion de artikoloj de SAT-Amikaro pri la lingva politiko en Eŭropo kaj pri la aŭstralia ambasadoro Ralph L. Harry (1917-2002).

Nun certe indus duobligi tiun ĉi agadon per same moderne aktiva germanlingva kampanjo, se ni volas eviti mal-ekvilibron rilate al la esperanto-informado en la du ĉefaj lingvo-regionoj alemana kaj romanda de nia lando. Kiel siatempe René-William Perrenoud nelacigeble kaj kompatente francigis la poresperantan informadon, kiun pretigis Arthur Baur, nun espereble sin proponos tradukanto(j) por la germanigo de la bonega franclingva materialo redaktata de Mireille Grosjean.



Tiu ĉi portreto aperis la 28-an de julio en la biela taggazeto *Le Journal du Jura* kun la mencio, ke Mireille Grosjean estas nelacigebla defend-

anto de esperanto kaj la svisa reprezentanto en la Universala Kongreso de Esperanto en Göteborg.

Mi povis konstati, ke la ĵurnalistoj kaj politikistoj plej ofte ne rekte ĉerpas artikolojn el la informado, kiun ni dissendadas, sed ke ili ĝenerale kreas personan dokumentaron, el kiu ili inspiriĝas, kiam ili verkas propran artikolon aŭ paroladon. En iliaj tekstoj mi havis la okazon relegi frazojn el dokumentoj, kiujn mi diskonigis antaŭ multaj jaroj. Tio atestas, ke ofte la koncernaj paperoj ne pereas en paperkorbo, sed konserviĝas favore al posta uzo.

Claude Gacond

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
& 032 967 68 55.

Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.
Retadreso: CDELI.VCH@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
claude.gacond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

Efike helpis la familio Chmielik

En la julia monato, dum tri semajnoj, gesinjoroj Tomasz kaj Danuta Chmielik kaj ilia filo Tomek alportis tre efikan helpon en CDELI. Dum Tomasz komputile registris la perkorespondan kurson siatempe redaktitan de Herbert Mayer, Danuta ordigis

arkivotajn korespondaĵojn de KCE kaj Tomek komputile registris la kolekto-situacion de la CDELI-periodaĵoj.

El Pollando Tomasz Chmielik alportis la frukton de plurjara laboro sub formo de gravurita disko, kiu ebligas konsulti ĉiujn artikolojn de Edmond Privat aperintajn en la socialista gazeto *La Sentinelle*. Pri tiu efika laboro ni havas la okazon reskribi.

Kaj reveninte en Pollando li daŭrigis la kopiadon de la perkoresponda kurso kaj fine de aŭgusto li povis anonci la konkludon de tiu streĉa laboro.

Tiel, dank'al lia helpa kontribuo, paralele al la perkoresponda kurso por la franclingvanoj, baldaŭ samtipa kursoj por la germanlingvanoj povos funkcii en Svislando. Kaj tiurilate ni havas la ĝojon anonci, ke ni trovis kunlaboronton por ĝin prizorgi en la persono de la ĵusemerito Hans Werner-Grossmann en MuttENZ. Do la decido de SES subvencii per frankoj 5000.- la reverkon kaj reeldonon de kurso por la germanlingvanoj ne restos sen rezulto. Ankaŭ pri tio ni havas la okazon reskribi. Nun alvenis la momento modernigi kaj kompletigi tiun ĉi kurson.

Claude Gacond

Studsabatoj didaktikaj ĉe CDELI

Sub la gvido de Claude Gacond, Nancy Fontannaz, Stefano Keller kaj Monika Molnar didaktikaj stud-sabatoj okazas preskaŭ ĉiumonate ĉe CDELI, krom dum la feriperiodoj. Ili alportas

utilan helpon al la lernantoj kaj instruantoj de esperanto. Tial ilia frekventado estas konsilinda al ĉiuj studemuloj. Kiu volas progresi en la praktiko de esperanto, tiu rezervu la 6 venontajn sabatojn en sia agendo: **novembre 15, 2004 januare 17, februare 21, marte 20, majo 15, junio 19 kaj novembre 20.**

La 24-an de majo la didaktika sabato grupigis 22 personojn. Dum Stefano Keller instruis al komencantoj, Monika Molnar paroligis la mezulojn, kaj Ed Borsboom, prezentis al la progresantoj la neordinarajn vivon kaj personecon de la fama esperanto-pedagogo Andreo Cseh, pri kiu li ĵus verkis interesan biografion. Liaj kompetento kaj humuro refoje entuziasmigis ĉiujn instruatojn.

Je la 21-a de junio ariĝis deko da partoprenantoj. Stefano Keller laboris kun la komencantoj kaj la progresantojn Claude Gacond renkontigis kun la verkisto Kabe, kies historia influo estas rememorinda.

Por la venonta novembra studsabato Claude Gacond pretigas 4 studkajerojn kun Nancy Fontannaz. Ili alportos fundamentajn konojn pri la vivo, penso kaj verkaro de L. L. Zamenhof. Monika Molnar, kiu instaliĝis en La Chaux-de-Fonds, gvidos paroligan rondon por la lingvomezuloj. Kun Stefano Keller pretiĝas prezento de esperanto al tutkomencantoj.

Principe la studsabatoj okazas la trian sabaton de la monato. La forpuŝo de la maja al la kvara sabato estis tre escepta. Tio tamen ne malhelpis du ĉeestantojn ankaŭ partopreni la semaj-

finan aranĝon de KCE. Jean-Jacques Lavanchy, unu el tiuj partoprenantoj en ambaŭ sinsekvaj aranĝoj, sin demandis, ĉu la samsabateco kaŭzis, ke nur eta grupo frekventis la duan renkonton. Ni povas respondi, ke fakte ne, ĉar ambaŭ kunvenoj allogis mal-similajn publikojn.

Claude Gácond

Historia raporto pri CDELI

En la franca estas nun verkita 36-paĝa historia raporto pri CDELI, kiu estas aĉetebla je la prezo de frankoj 5.- kun sendokostoj inkluditaj. Interesatoj esprimu sian deziron ricevi tiun ĉi dokumenton.

JES

junularo esperanta svislanda

Postfach 3324, 4002 Basel

Telefon-numero: 061 301 2705

info@jesperanto.ch

www.jesperanto.ch

Prezidanto. Benno FRAUCHIGER

Sekretario: Joëlle GROSJEAN

La junia numero de *Jes?* **kompreneble...** akompanas nian bultenon. **En ĝi aparte gravas la anonco de manifestacio okazonta en Genève la 6-an de decembro.**

Entute tiu bulteno de JES, kies diskonigon helpas SES, atestas pri la kuraĝiga vigliĝo de nia junularo

kaj pri la redakta kapablo de ĝia gvidanto Benno Frauchiger. Tiu ĉi, kiel raportas germanlingva artikolo, konkludis sian civilan deĵoron kadre de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds serve al CDELI. Espereble aliaj junaj esperantlingvaj civilistoj direktos sian laboremon al CDELI por daŭrigi la perkomputilan registradon de esperantaj kaj planlingvaj arĥivaĵoj.

Claude Gacond, la dankema arĥivisto de CDELI.

Projekto ankaŭ por SES-anoj

Vizito de la baza Lötschberg-tunelo

(laŭ letero de Benno Frauchiger)

La venonta Svisa Vintra Semajnfino de JES okazos inter la 13-a kaj la 15-a de februaro 2004 en Kandersteg. Mi tie rezervis ĉaledon. Kaj, ĉar tute apude (sube) troviĝas la konstruejo de la nova Lötschberg-tunelo, mi informiĝis pri gvidataj vizitoj al la konstruejo de tiu tunelo. La vizito daŭros 3 horojn, kaj inkluzivos viziton ĉe la informcentro Mitholz (inter Frutigen kaj Kandersteg) kun filmo pri la projekto, ktp. kaj vizito en la tunelo mem. La kostoj estas po Fr. 100.- por grupo de 17 personoj,

minimume devas esti 10 personoj. Povas esti pli ol 17 partoprenantoj, sed tiam ili dividiĝas laŭ pluraj grupoj, ĉar la busoj por iri en la tunelon nur akceptas 17 personojn. La lingvoj estas la franca, germana aŭ angla. (Ni do bezonos tradukisto(j)n).

Tiujare, jam ĉiuj datoj estas rizervitaj, do mi tuj rizervis la **vendredan posttagmezon 13an de februaro 2004** por vizito. Mi do proponas anonci tiun viziton kadre de *SES informas* por la junuloj, kaj samtempe por inviti SES-anojn por kune viziti kun ni la Lötschberg-tunelon konstruatan, kaj malfermotan en 2007. La junuloj poste iros al Kandersteg, por daŭrigi la svisan skiferion.

Pri la financado mi proponas jenon: JES okupiĝas pri la organizado. La SES-partoprenantoj kontribuas per po F 10.- por persono. JES donas deficitgarantion.

Pli detalaj informoj kaj oficialaj invit-tekstoj sekvos.

Kore salutas Benno Frauchiger

Gratulon al la JES-prezidanto por tiu ĉi vizit-projekto. Interesatoj al tiu aranĝo jam nun anoncu sin letere aŭ rete al Benno Frauchiger, por ke li ekkonu ilian nombron. Se mi ankoraŭ vivos, mi certe ĉestos!

Claude Gacond

Kontaktadreso:

Reta: Benno.Frauchiger@bluewin.ch

Poŝtaj:

Benno Frauchiger, Herrengrabenweg
27, 4054 Basel, Tel.:061 301 27 05
Benno Frauchiger, LASEN - EPFL,
1015 Lausanne, Tel.: 021 693 45 72.

Kunvenprogramo

Oktobre 25: Ĝenerala Asembleo de JES.

KCE

Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
& kaj fakso: (032) 926 74 07.
kce.esperanto@bluewin.ch

Raporto

*"Socia Esperanto-Forumo":
kiaj perspektivoj en Eŭropo?"*, tio estis la temo de la kultura semajnfino de KCE la 24-25-ajn de majo. Nur eta grupo ariĝis por partopreni en tiu interesa stud- kaj diskut-rondo sur la gvido de Kristian Garino, aktivulo en la regiona esperanto-asocio "Vigla Savojo" kaj en Florenco, federalisto.

Laŭmodaj estas la movadoj nomataj Sociaj Forumoj post la Monda Socia Forumo en la brazila urbo Porto Alegre. Eŭropa Socia Forumo okazis en Florenco fine de 2002. Ili respondas al la Ekonomia

Forumo de Davos, kie la ekonomiaj potenculoj decidas pri komerca tutmondiĝo aŭ globaliĝo.

La diskuto, sub la gvido de Kristian Garino, Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli, precizigis la difinojn de la vortoj "tutmondiĝo" kaj "globaliĝo".

Globaliĝo estas ligita al la celo maksimumigi profitojn kaj vastigi kapitalismon. Tutmondiĝo celas la disvolviĝon de la ekonomio, do ankaŭ de la kapitalismo, sed aldonas al tio humanisman dimencion.

La tutmondiĝon esprimas nur la angla lingvo. Neniu alia lingvo povas plene esprimi tion, kvankam en Eŭropo (laŭ Eŭropa Konsilio) la franca kaj la germana estas la plej parolataj, laŭ la nombro de ties parolantoj.

La angla bildigas la globaliĝan flankon en la mondo, esperanto devus bildigi la tutmondiĝan flankon: komunikilo kaj identigiĝo, eble eŭropa vojo al tutmondiĝo. Kiel diris la vicprezidanto de UEA Lee Chong-Yeong: socia forumo pridiskutas homajn rajtojn, lingvajn aspektojn de homaj rajtoj, lingvajn rajtojn, neŭtralecon kaj egalrajtecon, inkluzive de esperanto.

Konsekvence esperanto havas gravan rolon por ludi en la sociaj forumoj (regionaj, landaj, eŭropa, monda) kiel neŭtrale homa lingvo. Esperanto estas bezonata por krei

novan socion pli liberan kaj pli justan. La Esperanta Civito preferas agi en la movadoj de la federisma mondo, tio estas en la alternativaj sociaj movadoj, al kiuj apartenas mem la fenomeno esperanto, laŭ la substreka rimarko de Walter Zelazny.

Jean-Jacques Lavanchy.

SAT

76-a Kongreso de SAT La Chaux-de-Fonds 12-19-aj de julio

Raporto de Richard Schneller

Multfaceta kongreso

La 76-a SAT-kongreso okazis de la 12-a ĝis 19-a de julio en La Chaux-de-Fonds. Estis la dua en Svislando post tiu de la jaro 1981 en Basel. La programo de la kongreso estis tre varia kaj ŝarĝita. La laborkunsidoj de SAT kaj de ĝiaj frakcioj (ekologiisma-verda, komunista, liberecana, mondĉivitana, sennaciista) ebligis trakti gravajn demandojn per libera diskuto de la membroj.

Etiko de tutmondiĝo kaj federalismo

Dum la inaŭguro en la aŭlo de la liceo Blaise Cendrars, la sekretario de SAT, Krešimir Barkoviĉ,

prononcis anstataŭe la festparoladon de Kep Enderby (iama aŭstralia ministro ne povinta ĉeesti la kongreson), kiu pledis por etiko de tutmondiĝo.

Lise Berthet, reprezentanta la urbajn aŭtoritatojn, klarigis la funkciadon de la svisa federacio laŭ historia estiĝo kaj nuna praktiko. Ŝi esprimis la esperon, ke la mondo realigos veran universalan federacion kaj gratulis la ĉeestantojn pri la uzo de universala lingvo. Post la malferma sesio ŝi inaŭguris anstataŭ strato aŭ placo **Fruktoĝardenon de Esperanto** sur municipa grundo.

Esperanta kaj etna kulturoj

Okazis interesa debato pri la nova PIV sub la titolo "Plena Ilustrita Vortaro unu jaron poste: dankoj kaj mankoj" kun la du akademianoj Perla Martinelli kaj Michel Duc Goninaz.

Ne mankis interesaj prelegoj alt-nivelaj. François Degoul prelegis pri "La rolo de SAT kaj SAT-anoj en zamenhofologiaj studoj"; Giorgio Silfer pri "La Universala deklaro de lingvaj rajtoj"; Walter Ŝelazny pri "Esperanto vid-alvide al sociaj kaj religiaj pensoj kun aparta analizo pri lantiismo"; Daniel Durand pri "Al tutmonda demokratio: la preskaŭ 60-jara sperto de la mondĉivitanoj". Natalja Aroloviĉ rakontis per lum-bildoj la vivon de "La pentrista dinastio Benois" origine el Peterburgo kaj rifuĝintoj en Parizo.

Okazis staĝoj pri japana kulturo (Ando Viola Murasaki), kuba muziko kaj danco (Mayra Nuñez Hernández), literaturaj kafumoj kun István Nemere pri sia vivo, verkado kaj laste aperinta titolo "Krias la silento" kaj kun Hans-Georg Kaiser kiu prezentis sian tradukon "La mortula ŝipo" de B. Traven.

Socia forumo

La partoprenantoj de politika kaj socia forumo interŝanĝis spertojn el diversaj landoj. Dum la tuta kongreso oni multe parolis pri la Eŭropa Socia Forumo okazonta en novembro en Parizo kaj kiu inspiriĝas de la Monda Socia Forumo. Estis diskuto pri la maniero prezenti esperanton kiel taŭgan interkomprenilon por movado kun parencaj celoj.

Teatro kaj filmoj en esperanto

Scivoleme oni atendis la premieron de la dramo "La familio de Anto Speri" temanta pri denaskaj esperantistoj, identeca krizo familia kaj ŝanĝiĝoj por la homoj kaj socioj orienteŭropaj en la 1990-aj jaroj. Dum la aŭtoro Giorgio Silfer mem okupiĝis pri la lumoj, la juna bulgara reĝisoro Jordan Todorov gvidis la italan amatoran trupon el Torino. La tuta skipo rikoltis varman kaj kuraĝigan aplaŭdon de la publiko.

Alloga estis spektado de esperantaj filmoj kiel ekzemple "Mefisto" de István Szabó, "Angoroj" de J. L. Mahé, "Babel"

de Yvon Davis, “En Eŭropo ie”, hungara kontraŭmilita filmo, kaj “Espere despere”, tri humoraj teatraĵoj pri esperanto kaj ĝia socio.

Muziko kaj kantoj

Koncerto de klezmera kvarteto “Razzmatazz” (kiu signifas “tuj ŝatata”), sin inspiranta de jida tradicia muziko, entuziasmigis la aŭskultantojn. Post longdaŭra bankedo la artisto Solo(tronik) sukcesis dancigi eĉ grizharulojn per modernaj ritmoj. Al tio kontrastis la muzika recitalo kun lidoj de Schubert kaj Schumann en esperanto interpretitaj de Loretta Geiger kaj Jean-Thierry von Büren kun akompano de la pianistino Raluca Péquignot-Dumitrescu. Sekvis dadaisma interludo per koloraj kuboj kun samtempa recito de Jarlo Martelmonto. Finis la vesperon la populara kantistino Anjo Amika.

Malkovro de la regiono

Neŭŝatela folkloro grupo revivigis la tradiciajn kantojn kaj dancojn. En mallonga filmo kun la voĉo de Claude Piron surprizis nin la sonoj kaj mekanikoj de muzikaŭtomatoj fabrikitaj kaj ankoraŭ fabrikataj en la regiono de inĝeniaj horloĝistoj kaj artistoj.

Kompreneble la kongresanoj vizitis la urbon kaj ĝian horloĝan muzeon kaj ankaŭ la urban bibliotekon, kie troviĝas CDELI.

Merkrede matene okazis vizito de la urbo Neuchâtel kaj posttagmeze ekskurso al la gorĝoj de la

rivero Areuse, kiu troviĝas en naturprotektita areo. Marŝantoj tie renkontis surprizite ĉamon de proksime kaj povis observi cinklon, la sola paseroforma birdo kiu kapablas naĝi, plonĝi kaj piediri sub akvo serĉante nutraĵojn kaj konstruas ofte sian neston malantaŭ akvofalo. Por la tagmanĝo oni regalis la ekskursantojn per bonĝustaj trutoj.

Dum kunveno de la liberecanoj Guy Cavalier prezentis la historion de la ĵurasa federacio. El la kongreso de Saint-Imier originas la unuaj anarkiistaj principoj. Kelkaj kamaradoj grupe vizitis la lokajn aktivulojn “Espace Noir” en Saint-Imier.

La komunista frakcio ricevis la viziton de la ĉaŭdefonano Alain Bringolf, prezidanto de la Svisa komunista partio (POP) kaj favora al esperanto.

Tre kontentaj revenis la partoprenintoj al la antaŭkongreso el Grindelwald, loko en la montaro, kie impresas la pintoj de la Bernaj Alpoj: daŭre brilis la suno kaj ne estis varmego.

Fino de sukcesa kongreso

En tiu semajno okazis ankaŭ ekster la oficiala kongresa programo esperantokursoj en KCE proksime de la kongresejo. Same la Esperanta Civito debatis aparte en la magistrato dum du tuttagaj kunvenoj.

La kongresanoj profitis de speciala eldono de kvin dupaĝaj

numeroj de *Heroldo de Esperanto* kun la taga programo kaj raportoj pri la antaŭtagaj okazintaĵoj.

Ĉio ĉi postulis de la organizantoj grandajn fortostreĉojn. Versajne tiu elĉerpiga okupiteco estis la kaŭzo de kelkaj organizaj mankoj kaj malfruoj ne tre gravaj dum tiu multfaceta kaj entute sukcesa kongreso.

Fine la prezidanto de la plenumkomitato de SAT, Jakvo Schram, kontente konkludis kaj fermis la kongreson invitante ĉiujn al la venontjara en Bratislavo (Slovakio).

Rimarko

La agendo de ĉi tiu kongreso estis tre ŝarĝita. La programo aperis en *Sennaciulo* nur provizore kaj poste kun ŝanĝoj en la specialaj eldonoj de *Heroldo* por la koncerna tago. Plej ofte ni havis tiujn indikojn nur je la deka horo de la koncerna tago, kiam la kunvenoj jam estis komencintaj ekde la naŭa. (En ĉiutaga gazeto ekzemple oni anoncas la kunvenojn ĉiam la antaŭan tagon.) Cetere tiu agendo estis tre nepreciza, ekzemple por prelegoj estis nur la nomo de la preleganto inter krampoj, sed neniu mencio pri la temo. Ĉu la tradicia metodo de faldfolio aŭ broŝureto kun detala priskribo de la okazontaĵoj liverita kun la kongresaj dokumentoj kaj eventualaj postaj ŝanĝoj sur afiŝa tabulo en la kongresejo ne estus pli taŭga?

SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud EGGENBERGER, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur & 052 233 47 64
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

Novembre 15: GERI-renkonto.

UEA

Ĉefdelegito en Svislando

François RANDIN

Av. de Chailly 10, CP 115,

1000 Lausanne 12.

Tel. 076 411 14 55, fakso 021 657 14 56.

Universala Kongreso

en kiu Mireille Grosjean

aktivegis

1'800 personoj venis al Göttenborg por la Univerala Kongreso, inter ili proksimume 35 Svisoj.

Bela vetero feliĉigis la partoprenantojn. Sed ne nur... bona etoso, interesaj prelegoj, amuzaj partoj, homaj kontaktoj, novaj renkontiĝoj, revido de geamikoj. La kongresejo similis svarmon de mateno ĝis vespero.

Nia svisa reprezentanto Mireille Grosjean transprenis 3 taskojn, kiuj okupis ŝin komplete: unue la

ekzamenoj (ŝi respondecis pri la sesio, tio okupis sabaton kaj dimanĉon por trovi surloke kunlaborantojn, inter ili Nancy Fontannaz kaj Jean-Thierry von Büren; tiuj ekzamenoj daŭris 3 duonajn tagojn), due la komitato, kie ŝi reprezentas Svislandon ekde 1998 (3 duonaj tagoj), trie la Internacia Arta Vespero, kiun ŝi jam gvidis en Fortaleza en 2002 kaj kiun ŝi denove organizis en Göttenborg (2 posttagmezoj kaj unu vespero). Dum tiu Internacia Arta Vespero Sinjoro Martin Meyer, blindulo el Zuriko, ludis per sia memfarita fluto, kies nomo estas « panalotos »; Jean-Thierry von Büren belege kantis dum tiu vespero.



Je la reveno de Mireille Grosjean el la UK en Göttenborg la gazeto *L'Impartial* raportis pri ŝi per tre bona artikolo aperinta la 14-an de aŭgusto kun portreto energi plena



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, & 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Venontaj kunvenoj

Septembre 25: Ĉiu rakontas pri siaj ferioj.

27: Por la centjara jubilea tago de SES en Lausanne-Ouchy-Rolle. Trajna forveturo: 7h24.

Oktobre 23: Invito ĉe la familio BEROU-D-OCKE.

Novembre 27: Programo 2004.

Surstrata agado en Basel

Sub sunplena ĉielo mi demonstracis miajn esperantaĵojn okaze de la festo de la unua de majo. Mian tablon kovris nia verda standardo kaj flanke pendis flago kun surskribo *Pace* sur fono ĉielarka.

Pasantoj interesiĝis argumentante, ke necesas kontraŭstari la imperiismon anglan-usonan. Pluraj diris, ke ili persone konas esperantistojn kaj aĉetis donacojn, ekzemple trivoluman komikson pri la rusiaj revolucioj, poemaron de Maŭ Zedong aŭ de bulgaraj poetoj. Nur de mia stando aĉeteblis la manifesto de komunistoj.

Mi konsideras la tagon kiel sukcesa kaj mi nepre repartoprenos venontjare la tagon de la laboristoj.

Dieter Rooke

Fribourg

Septembre 27: Por la centjara jubilea tago de SES en Lausanne-Ouchy-Rolle. Trajna forveturo: 9h09.

Forum Social Suisse 20-21an de septembro

SES havos budon

Post Porto Alegre en Brazilo (Forum social mondial) okazos en la sama stilo socia forumo en Svislando, por Svislando, pli precize en Fribourg la 20-21-ajn de septembro.

La organizantoj de la poresperanta budo, Benno Frauchiger (prezidanto de JES) kaj Mireille Grosjean, ankoraŭ serĉas kunlaborantojn el tuta Svislando, kiuj bonvolos sin anonci telefone ĉe Mireille: 032 932 18 88. Temas pri disdono de informiloj surstrate kaj pri respondo al eblaj demandoj.

Okazos seminario pri la lingva problemo, kiun gvidos Claude Piron. Ni danku al li, ke li akceptis prelegi.

Do, ni aliras al juna publiko malfermita al novaĵoj. Estas grava paŝo, kiu povas porti multajn fruktojn.

Mireille Grosjean

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Espéranto-infos: & 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des Gares, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 19-a horo.


Septembre 27: Por la centjara jubilea tago de SES en Lausanne-Ouchy-Rolle. Trajna forveturo: 9h18.

Raporto

En la julia-aŭgusta numero 2003-7-8 de *Brasikfolio* Charmian Common resumas prelegon de

Bruno Graf pri la strukturo de la svisa esperanto per la sekva bildo titolita

Strukturo de svisa Esperantio.



La artikolo de Charmian Common, kiu akompanas tiun ĉi bildon, povus esti bona bazo diskuta pri la nuna strukturo de la svisa esperanto-movado.

Indas atentigi, ke la koncerna bildo ne bone komprenigas, ke TEJO estas sekcio de UEA, ke CDELI estas fako de la publika Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Ĝi ankaŭ ne konsideras la aktivecon de *Esperanto perkoresponde*, kiu kadre de CDELI kaj en kunlaboro kun SES funkciigas la perkorespondan kurson por la franclingvanoj kaj baldaŭ por la germanlingvanoj, funkciigas libro-servon kaj organizas studrondojn

por la neŭŝateloj kaj studsabatojn didaktikajn por la instruantoj kaj studentoj de esperanto, kiuj estas regule frekventataj de ĝenevanoj. Ĉu tiu *Esperanto perkoresponde* desegne devus situi inter la lokaj grupoj? Kaj mankas La *Kooperativo de Literatura Foiro*, kiu havas internacian karakteron.

Jes ja, komplekas nia movado, kaj atenta ekzameno de ĝia efektiva konsisto aga kaj jura povus esti interesa studtemo por SES-renkonto.

Claude Gacond

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

&: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

Diskuta rondo: ĉiun trian lundon kun François RANDIN, en Chailly-Lausanne. Bonvolu telefone voki lin antaŭe 076 411 14 55.

Septembre 27: Centjara jubilea tago de SES.

Rendevuo en Ouchy je la 09h45.

La helpantoj ne forgesu iri atendi la trajne alvenantojn sur la koncernaj stacidomaj kajoj.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
& 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg.)

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - konversacia rondo de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz BRÜGGER en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

Raporto

Ekskurso de la 9-a de aŭgusto

Unu el la kulminoj dum societa jaro certe estas la ekskurso. Pruvis tion la fakto, ke sabate la 9-an de aŭgusto entute 15 esperantanoj estis allogitaj de la iom mistera invito. Ili ne bedaŭris. En belega vetero kaj sub la lerta gvido de Koni Rey ĉiuj travivis plej ĝojplenajn, amuzajn kvar horojn kun multaj surprizoj. Post intence misdirektita ĉirkaŭpromenadeto ni suriris unu de la famaj vaporŝipoj, kiuj majeste cirkulas sur la lago lucerna, la 'Unterwalden', konstruita en la jaro 1902; ĝi do aĝas eĉ unu jaron pli ol Svisa Esperanto Societo!

Oficiala bonvenigo en esperanto tra la laŭtparolilo kaj persona saluto de la kapitano Mosimann estis

danke aplaŭdita kaj tostita per libere servita aperitivo en la salono, kiu aspektas ankoraŭ tiel, kiel la arkitekto Filippo Cassino el Milano siatempe ornamis ĝin.



Kapitano Mosimann kaj Kony Rey
Fotis Sonja Brun

La vojaĝo iris en la direkto al Alpnach. Por atingi tiun havenon la ŝipo devis subiri malaltan ponton, kio nececis la subenmetigon de la kamentubo kaj de la signaliloj. Eĉ la stirejo devis esti mallevigita, teknik-aĵo kiun ni observis kun granda miro de sur la ferdeko.

Sur la hejmenvojaĝo alia surprizo atendis nin en formo de luksa intermanĝo, akompanata de bonaj trinkaĵoj laŭguste.

La bona etoso estis riĉigita per la akordeonludado de nia muzikisto Paul Scherer.

La gaja babilado, ridado kaj eĉ dancado atestis la grandan sukceson de la LES-ekskurso 2003. La tuto estis sponsorigita; sed ĉe la fino la partoprenantoj estis petataj

kontribui laŭplaĉan sumon al Esperanto establo. Imitinda gesto!

Sonja Brun

Venontaj kunvenoj

Konversacia rondo de la 14-a horo ĝis la 16-a kun Franz BRÜCKER en restoracio Simplon la 5-an de novembro kaj 7-an de januaro 2004.

Septembre 27: Por la centjara jubilea tago de SES en Lausanne-Ouchy-Rolle. Trajna forveturo: 6h54.

Oktobre 1: 14h00: Konversacio kun Franz BRÜGGER; **14h30:** Distraĵoj kun Paul SCHERER.


Decembre 3: Zamenhofa festo. **14h00:** El la verkaro de Zamenhof kun Paul SCHERER; **14h30:** Kompilado de la programo 2004.

Kantono de Neuchâtel

La Chaux-de-Fonds

Septembre 27: Por la centjara jubilea tago de SES en Lausanne-Ouchy-Rolle. Trajna forveturo: 8h16.

5 denaskuloj en La Chaux-de-Fonds



Romain, kiam li estis dujara, kun sia patrino Marion laŭ foto sistempe aperinta en la taggazeto *Le Nouveau Quotidien*.

La 16-a de julio ebligis kunvenon de 5 infanoj, kiuj parolas aŭ paroletas (en la aĝo de 12 monatoj!) esperanton. Temis pri Romain (1998) kaj Samuel (2002) Bélisle kaj 2 samaĝaj usonaj gastoj. Plie alvenis familio Lelarge-Kovats kun Martin (2001). Katalin Kovats-Schmideliusz, la patrino, multe laboris ĉe KCE kune kun Claude Gacond kaj Mireille Grosjean en la 80-aj jaroj. Ŝi venis al Les Brenets por kunsido kun Mireille Grosjean. Entute estis en La Chaux-de-Fonds 13 gesperantistoj, kiuj akceptis sinjorinon Hugi el *Journal du Jura* en Biel/Bienne. La ĵurnalistino estis ege impresita kaj ŝatis demandadi al ĉiuj pri esperanto kaj esperanto-edukado. La rezulto de tiu

kunveno estis preskaŭ tutaĝa artikolo pri esperanto en tiu biela ĵurnalo.

Studaj rondoj ĉe CDELI

Dum la lastaj vesperoj ĉiuj alportis kaj klarigis ludojn, kio kreis tre agrablan paroligan etoson.

Datoj de la venontaj studvesperoj: novembre 4 kaj 25, decembre 9, 2004 januare 6 kaj 20, februare 3 kaj 17, marte 9 kaj 23, majo 4 kaj 18, junio 8 kaj 22. **Notu tiujn datojn en via agendo.**

Eniro en la CDELI-salonon eblas ekde la 19h45. **Studo de la 20h00 ĝis la 21h45.** Fermo de la salono je la 22h00. Alvenantoj premu la sonorilan butonon, kiu troviĝas maldekstre de la enirpordo al CDELI. (Nord-orienta pordo de la Biblioteka Domo).

Claude GACOND.

Neuchâtel

Septembro 27: Por la centjara jubilea tago de SES en Lausanne-Ouchy-Rolle. Trajna forveturo: 8h52.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE, Lettenstrasse 70, 9500 Wil. & 071 911 68 30.

Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER, Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil. & 071 393 41 49.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

Venontaj kunvenoj

Septembre 27: Por la centjara jubilea tago de SES en Lausanne-Ouchy-Rolle. Trajna forveturo: 6h39.

Oktobre 01: Raportoj kaj impresoj pri esperanto-kongresoj en 2003.

Novembre 05: Temo elektota.

Decembre 03: Adventa vespero kun V. CHAVES-WALDER, B. POCHANKE kaj L. SENNHAUSER.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH
& 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>

Kunvenoj regule la duan sabaton de la monato matene je la 11h00 kun komuna manĝo en la klub-sidejo Esperantejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich-Seefeld.

Septembre 27: Por la centjara jubilea tago de SES en Lausanne-Ouchy-Rolle. Trajna forveturo: 7h34.

Raporto

Dietrich Weidmann estis intervjuita pri esperanto, kaj sekve al tiu radio-elsendo li ricevis diversajn informpetojn. Inter ili la plej grava estas peto veninta el la Popola Altlernejo en Trogen, kiu petis la organizon de esperanto-kurso en Trogen. Fakte la direktoro

post aŭdo de la intervjuo direktis
sian peton al Esperanto-Klubo en

Wil kaj Pochanke transsendis ĝin al
Dietrich Weidmann.

Libroj

Tri novaj tradukoj

Lastatempe aperis tri novaj titoloj de Rudolf Steiner en traduko de Willy Nüesch.

Antropozofia animkalendaro

Kvindek du semajnaj sentencoj kiel akompano de la animo tra la sezonoj. Originalo kaj traduko vidalvide.

Antropozofiaj gvidfrazoj

Rudolf Steiner skribis post la fondiĝo de la Ĝenerala Antropozofia Societo (1923) ĝis sia morto en marto 1925 serion da 185 *Antropozofiaj gvidfrazoj* kaj *Leteroj al la membroj*, kiuj regule aperis en la informbulteno de la societo. La subtitoloj indikas la temojn: La vivanta naturo de la antropozofio kaj ĝia flego – La ekkonovojo de la antropozofio – La Miĥaelo-mistero.

La kvina evangelio

(El la Akaŝo-esplorado)

Dum serio de prelegoj pri la kvar evangelioj Rudolf Steiner permesis al siaj aŭskultantoj profundajn enrigardojn pri la spirita valoro de tiuj revelacioj. La rezultoj de la spiritaj esploroj pri la vivo de la historia Jesuo konsistigas la enhavon de la kvina evangelio. Al la ĉefaj motivoj de la prelegoj apartenas:


Travivaĵoj de Jesuo de Nazareto dum infaneco kaj jun-aĝo ĝis la bapto en Jordano.

Lia suferiga konsciigo pri la ĉeso de la grandaj antikvaj spiritofluoj.

Liaj rilatoj kun la Esenoj kaj Johano-Baptisto.

Travivaĵoj dum iro al la baptiĝo en Jordano.

Richard Schneller



Kongresen

Prelegpropono

**de tajvana esperantoparolanto
vizitonta Germanion, Francion kaj
Svislandon kun sia edzino**

S-ro Zhong Qiyao intencas viziti Germanion, Francion kaj Svislandon kun sia edzino. Laŭ rekomendo de la irana esperantisto Reza Kheir Khah <reza@ms58.hinet.net>, kiu vivas kaj multe aktivas en Tajvano, ni proponas al kluboj, kiuj povas inviti, helpi aŭ gvidi ilin, aŭ konsili ilin pri nekosta tranoktado, rekte rilati kun li <zhong@accton.com.tw> <<mailto:zhong@accton.com.tw>>>.

Jam tre bone okazis vojaĝo de irana esperantistino, kiun Reza rekomendis antaŭ kelkaj monatoj. Bonvena estos kunordigado en Germanio, Francio kaj Svislando por organizi plej racie tiun restadon profite al publika diskonigo de esperanto en amasinformiloj (kopio bonvena al la Gazetara Servo por sekvi la evoluon de la afero). Post unu semajno, Qiyao vizitos Reza'n por paroli pri tiu vojaĝo. Jen memprezento de Qiyao:

Mi estas viro. Mi naskiĝis en 1968 en Honkongo (Hong Kong, Ĉina Ĉeftero), diplomiĝis kaj laboris en Usono, kaj nun loĝas en Tajvano (Taiwan). Mi esperas vojaĝi kun mia edzino, maksimume de 2003-oktobro-04 (atingonte Eŭropon) ĝis oktobro-19 (forlasante Europon), depende de tempo-haveblo de gastigantoj aŭ gvidantoj. Pro viza oportuneco, tre eble, ke ni unue vizitos Germanion, kaj poste Francion kaj Svislandon. Mi lernis esperanton antaŭ pli ol dek jaroj, kaj nun parolas sufiĉe bone por ĉiutagaj aferoj, sed ne teknikaj sciaĵoj. Mia edzino ne parolas esperanton. Mi estas membro de UEA, Ĉina Esperanto-Ligo, kaj Tajvana Esperantista Asocio. Mi iam kaj iam partoprenas en esperantaj kunvenoj en Tajvano. Mi iam kaj iam (eble unu aŭ du fojojn jare) gastigas esperantistajn gastojn. Mi instruas esperanton interrete. Profesie, jam ekde dek jaroj mi estas inĝeniero pri komputilaj programoj. Mi laboras por kompanio, kiu fabrikas varojn por komputila reto. Eksterprofesie

miaj interesoj inkluzivas budhismon, naturmedian protektismon, trafikana plibonigon. Por prelegi iom pri Tajvano, eble mia edzino povos pretigi ion, kaj mi tradukos ŝin esperanten. Ni manĝas malmultan viandon, ne drinkas alkoholaĵojn, kaj ne fumas. Ni petas nefumantajn gastigantojn kaj gvidantojn. Qiyao.

Laŭ informo de la Gazetara servo de SAT-Amikaro redaktata de Henri Masson <esperohm@club-internet.fr> <http://www.esperanto-sat.info>

Pri la IKEK-Konferenco

De la 23-a ĝis la 28-a de majo Dieter Rooke partoprenis la konferencon de Internacia Kolektivo de Esperantistoj Komunistaj, kiu okazis en Bankjo, termobanejo proksima al Sofia. En tiu aranĝo renkontiĝis 2 britoj, 2 svisoj: (Ana Lisa Nicolodi kaj Dieter Rooke), 1 portugalo, 1 kubano, 1 serbino kaj multaj bulgarioj, inter kiuj T. Trifončovski, kiu salutis nome de la Civito.

Okazis prelegoj pri la komunistaj movadoj tutmonde, pri la Internacio, pri la eksa komunisto reĝimo en Bulgario, pri la historio de bulgara esperanto-movado, pri Kubo.

Rimarkinda estis dum la inaŭguro la kontribuo de ĥoro, kiu, post la

esperanto-himno, prezentis kantojn el diversaj regionoj de Bulgario.

Dank al socialista deputito la konferencanoj informiĝis pri la nuntempa stato politika kaj ekonomia en Bulgario post la kolapso de la komunisma reĝimo en 1998. Nun la bulgarioj 95% vivaĉas mizere kun eta salajro aŭ pensio.

Reelektiĝis estraro de IKEK, kies nova prezidanto estas la brito S. Keable.

20-a jubilea Internacia Festivalo en Kiel

(Norda Germanio)

27 decembro – 3 januaro 2003

La koncerna festivalo estas unu el la plej famaj esperantaj aranĝoj por familioj kaj personoj 25-55 jaraĝaj. Kiuj ŝatus festi la eniron en novan jaron en agrabla esperanta etoso, tiuj petu la detalan informilon al:

Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein (Germanio).

Retpoŝto:

HDP@internacia-festivalo.de

-oOo-